

[Sube en Esperanto]

EsperantoLand · L. F. v. Wunsch-Rolshoven
2. Gartenhaus · Wiciefstr. 9 · 10551 Berlin

Herrn
Bundespräsidenten Joachim Gauck
Schloss Bellevue
D-11010 Berlin

Louis F. v. Wunsch-Rolshoven
Wiciefstr. 9, 2. Gartenhaus
10551 Berlin
Tel.: 030 – 685 58 31
E-Mail: lu.esperantoland@gmx.de

4. 3. 2013

Ihre Rede zu Europa am Freitag, 22. Februar 2013
Englisch und andere Sprachen lernen

Sehr verehrter Herr Bundespräsident,

in Ihrer Rede am Freitag, 22. Februar, haben Sie die unzureichende Kommunikation innerhalb Europas als ein Hauptproblem bei der Herausbildung einer engeren europäischen Gemeinschaft dargestellt. Sicher brauchen Europas Bürger eine gemeinsame Sprache oder auch mehrere gemeinsame Sprachen – um miteinander zu reden und sich kennenzulernen, um über gemeinsame Themen zu sprechen, privat und beruflich, und um ihre Freizeit und Ferien in angenehmer Weise miteinander zu verbringen und Vertrauen aufzubauen.

Ob hierbei alle nach einer Façon glücklich werden sollen (und vor allem Englisch lernen, wie Sie es befürwortet haben) oder ob jeder nach seiner Façon glücklich werden soll, also mit den Sprachen, die er oder sie für wichtig hält, z.B. der Sprache des jeweiligen Nachbarn, das ist zu überlegen. Der deutsch-französische Dialog ist jedenfalls nur schwer denkbar auf der Grundlage des Englischen. Die EU und die EU-Regierungschefs legen den EU-Bürgern nahe, zwei Fremdsprachen zu lernen; ich hoffe davon ausgehen zu dürfen, dass auch Sie dies befürworten.

Die Konzentration auf das Englische birgt – bei allen Vorteilen einer Einigung auf nur eine Sprache – die Gefahr, dass die anderen Sprachen und damit auch deren Kulturen vernachlässigt werden. Wenn der Sprachaufenthalt vor allem im englischen Sprachraum stattfindet und wenn anschließend Kulturgüter wie Filme und Bücher vor allem aus dem englischen Sprachraum kommen, weil sie dann leichter beurteilt, übersetzt und verstanden werden, dann ist das Zusammenwachsen von Europa schwer. Vielleicht ist Ihnen bewusst, dass in Kontinental-Europa bei den übersetzten Büchern die Herkunftssprache in 60 bis 80 % der Fälle Englisch ist, bei Filmen ist der Prozentsatz noch höher. Eine solche einseitige Ausrichtung der übersetzten Literatur und des Films dient dem europäischen kulturellen Austausch leider nicht. Dies ist ein Pferdefuß bei dem so plausibel scheinenden Vorschlag, dass alle Englisch lernen.

Seit Jahrzehnten wird in Deutschland das Englische gefordert und gefördert, in Schulen und Universitäten und an vielen anderen Orten. Ihrer Rede entnehme ich, dass nach Ihrer Auffassung der Erfolg dieser intensiven Bemühungen in gewisser Hinsicht eher begrenzt ist – sie haben gesagt, Europa habe bislang „keine gemeinsame europäische Öffentlichkeit“. Dem stimme ich zu und auch ich bedaure dies. Wenn das Englische so lange gepredigt und unterrichtet wurde und sich eine gemeinsame europäische Öffentlichkeit immer noch nicht gebildet hat – ist es da nicht Zeit, nach den Ursachen zu fragen?

Die Menschen lernen in der Regel nicht unbedingt die Sprachen, die die Politiker ihnen empfehlen, sondern eher diejenigen, die sie sinnvollerweise brauchen, auch angesichts des Aufwands, der für Fremdsprachen zu treiben ist. Der ist für Sprachen wie Englisch oder Französisch außerordentlich hoch – in den Schulen kommt ein Abiturient selten unter 1000 Unterrichtsstunden Englisch davon; das bedeutet mit der häuslichen Arbeit in der Regel ein Arbeitsjahr oder mehr. Ein Jahr, das für andere Lerninhalte nicht zur Verfügung steht, auch das ist zu bedenken. Der Erfolg ist oft recht bescheiden.

Demgegenüber braucht man für dasselbe Sprachniveau in der internationalen Sprache Esperanto nur etwa ein Drittel der Zeit – oder andersherum: Mit 1000 Stunden Esperanto erreicht man ein weit höheres Niveau der Sprachbeherrschung als man dies im Englischen mit 1000 Stunden erreichen kann und man fühlt sich in dieser Sprache dann weit mehr zuhause. Dies mag nicht leicht nachzuvollziehen sein, weil Esperanto als künstliche Sprache gilt – das war 1887 richtig, heute ist Esperanto eine lebendige Sprache. Dass Esperanto als eigene Sprache empfunden wird, in der man sich zuhause fühlt, in der man internationale Kontakte pflegt, ist ein wesentlicher Grund, warum Menschen Esperanto lernen und sprechen.

Ein anderer Grund ist die Internationalität des Esperanto – man kann Esperanto in jedem europäischen Land lernen und weiter praktizieren. So wird der europäische Austausch betrieben, nicht nur von den englischsprachigen Ländern ausgehend.

Ich möchte nun nicht darum bitten, die internationale Sprache Esperanto besonders zu fördern (auch wenn ich das sicher für sinnvoll halte) – ich würde mich schon sehr freuen, wenn Sie sich dafür einsetzen könnten, dass Esperanto mit anderen Sprachen gleichbehandelt wird, dass die Diskriminierung von Esperantosprechern beendet wird und dass über Esperanto und die Anliegen der Esperantosprecher von staatlichen Stellen zutreffend informiert wird. Ich werde dies in einem späteren Brief noch ausführen.

Es dürfte kaum eine Gruppe in Europa geben, die mehr Erfahrung mit europäischer Verständigung hat und mehr Engagement für den Dialog zwischen den Bürgern verschiedener Staaten zeigt als die Esperanto-Sprachgemeinschaft. Völkerverständigung ist unser Anliegen seit der Veröffentlichung von Esperanto 1887 – sich verständigen und sich verstehen, über Grenzen hinweg, europaweit und weltweit.

Mit vorzüglicher Hochachtung

Louis F. v. Wunsch-Rolshoven

Al s-ro
Federacia Prezidento Joachim Gauck

4-a de marto 2013

**Via parolado pri Eŭropo en vendredo, 22-a de februaro 2013
Lerni la anglan kaj aliajn lingvojn**

Altestimata sinjoro Federacia Prezidento,

en via parolado en vendredo, 22-a de februaro, vi prezentis la nesufiĉan komunikadon ene de Eŭropo kiel ĉefan problemon ĉe la formiĝo de pli kuna eŭropa komunumo. Certe la civitanoj de Eŭropo bezonas komunan lingvon aŭ eĉ plurajn komunajn lingvojn – por interparoli kaj konatiĝi, por paroli pri komunaj temoj, private kaj profesie, por agrable pasigi libertempon kaj feriojn kaj por krei fidon.

Ĉu ĉe tio ĉiuj feliĉiĝu laŭ unu maniero (kaj lernu ĉefe la anglan, kiel vi subtenis) aŭ ĉu ĉiu feliĉiĝu laŭ sia maniero, do per la lingvoj, kiujn li aŭ ŝi konsideras gravaj, ekzemple la lingvo de la koncerna najbaro, tio estas pripensinda. La german-franca dialogo ĉiukaze estas nur malfacile pensebla surbaze de la angla. La Eŭropa Unio kaj la ĉefoj de la registaroj de EU rekomendas al la EU-civitanoj lerni du fremdajn lingvojn; mi esperas povi eliri de tio, ke ankaŭ vi subtenas tion.

La koncentriĝo je la angla enhavas – apud ĉiuj avantaĝoj de interkonsento je nur unu lingvo – la danĝeron, ke la aliaj lingvoj kaj per tio ankaŭ ties kulturoj estas neglektataj. Se la lingvostaĝo okazas ĉefe en la angla lingvoregiono kaj se poste kulturaj aĵoj kiel filmoj kaj libroj venas ĉefe el la angla lingvoregiono, ĉar tiam oni povas ilin pli facile prijuĝi, traduki kaj kompreni, tiam la kunkreskado de Eŭropo malfacilas. Eble vi konscias, ke en kontinenta Eŭropo ĉe la tradukitaj libroj la devena lingvo en 60 ĝis 80 % estas la angla, ĉe filmoj la procentaĵo estas ankoraŭ pli alta. Tiel unuflanka orientiĝo de la tradukita literaturo kaj de la filmoj bedaŭrinde ne servas je la eŭropa kultura interŝanĝo. Tio estas grava malavantaĝo de la tiel konvinke ŝajnanta propono, ke ĉiuj lernu la anglan.

Ekde jardekoj en Germanio oni postulas kaj subtenas la anglan, en lernejoj kaj universitatoj kaj en multaj aliaj lokoj. Mi trovas en via parolado, ke laŭ via opinio la sukceso de tiuj intensaj klopodoj en certa rilato estas relative limigita – vi diris, ke Eŭropo ĝis nun ne havas „komunan eŭropan publikon“. Mi konsentas kun tio kaj ankaŭ mi bedaŭras tion. Se tiom longe oni predikis kaj instruis la anglan kaj ankoraŭ ne formiĝis komuna eŭropa publiko – ĉu tiam ne estas tempo demandi pri la kaŭzoj?

La homoj ĝenerale ne nepre lernas la lingvojn, kiujn la politikistoj rekomendas al ili, sed tendence tiujn, kiujn ili senchave bezonas, ankaŭ konsiderante la tempon kaj elspezojn necesajn por akiri fremdlingvojn. Tiuj estas relative grandaj por lingvoj kiel la angla aŭ franca – en la lernejoj abituriento malofte sukcesas eskapi kun malpli ol 1000 instruhoroj de la angla; tio kun la hejma laboro kutime signifas unu laborjaron aŭ pli. Unu jaro, kiu ne disponas por aliaj lernaĵoj, ankaŭ tion indas konsideri. La sukceso ofte estas relative modesta.

Kontraste por la sama lingvonivelo en la internacia lingvo Esperanto oni bezonas nur ĉ. trionon de la tempo – aŭ alidirekte: Per 1000 horoj en Esperanto oni atingas multe pli altan nivelon de lingvoregado ol oni povas atingi per 1000 horoj en la angla kaj oni en tiu lingvo sentas sin multe pli hejme. Tion akcepti eble ne facilas, ĉar Esperanto estas konata kiel artefarita lingvo – tio estis ĝusta en 1887, hodiaŭ Esperanto estas vivanta lingvo. Ke Esperanto estas sentata kiel propra lingvo, en kiu oni sentas sin hejme, en kiu oni flegas internaciajn kontaktojn, tio estas esenca kaŭzo, kial homoj lernas kaj parolas Esperanton.

Alia kaŭzo estas la internacieco de Esperanto – en ĉiu eŭropa lando oni povas lerni kaj plupraktiki Esperanton. Tiel oni realigas la eŭropan interŝanĝon, ne nur elirante de la anglalingvaj landoj.

Mi nun ne volas peti vin aparte subteni la internacian lingvon Esperanto (eĉ se mi certe konsideras tion senchava) – mi jam tre ĝojus, se vi povus engaĝiĝi por ke Esperanto estu samrajte traktata kun aliaj

lingvoj, por ke la diskriminacio de Esperanto-parolantoj estu finita kaj por ke pri Esperanto kaj pri la proponoj de la Esperanto-parolantoj ŝtataj instancoj ĝuste informu. Mi detaligos tion en posta letero.

Supozeble apenaŭ estas grupo en Eŭropo, kiu havas pli da sperto kun eŭropa interkompreniĝo kaj kiu montras pli da engaĝiĝo por la dialogo inter la civitanoj de diversaj ŝtatoj ol la Esperanto-lingvokomunumo. Popola interkompreniĝo estas nia deziro ekde la publikigo de Esperanto en 1887 – lingve interkompreniĝi kaj kompreni unu la alian, trans limoj, tuteŭrope kaj tutmonde.

Kun aparta estimo

Louis F. v. Wunsch-Rolshoven